



RADE-informilo 30

**Novembro
2012**


Enkonduko

Saluton, karaj RADE-membroj de la tuta mondo,

Delonge vi kutimis ricevi ĉiu jare tre bone engaĝigitajn R.A.D.E. informilojn skribitajn de Giuseppe Grattapaglia. Ĉi foje Giuseppe ne havas tempon por redakti nian ĵurnaleton ĉar li havas tro da laboro en Bona Espero kie denove fajro bruligis grandajn kampojn. La lignajn trabojn de unu el liaj 3 pontoj detruigis la fajro kaj nun ne eblas iri al la alia flanko de la bieno. Do ni bondeziras al Giuseppe kaj Ursula kuraĝon por rebonigi damaĝojn. Tamen Giuseppe sendis al mi informojn kiujn li kolektis. Do mi provis eldoni la 30-an informilon.

Joseph van der Vleugel, prezidanto
Joseph.vandervleugel@skynet.be

Letero de Eskil Svane¹ kaj agado de Ron Glossop



Nia honora prezidanto Eskil Svane, kiu nuntempe loĝas en la trankvila urbo Ascona en Svislando, ĉe la bordo de Lago Maggiore, konstante sekvas la agadon de RADE. En lia letero de la 22a de julio, li favore komentariis la ĉeeston de RADE en Bangkoko kaj la artikolon de Ronald Glossop aperinta en la junia numero de la revuo "Esperanto" de UEA.

Antaŭen kara Eskil !

Jen vi povas legi la artikolon de Ron Glossop

¹ Vidu fine de tiu ĉi informilo elтирајon de letero kiun Svane skribis antaŭlonge al L. Lentaigne. Ĉu vi memoras Svane?

En la jaro 2012 la internacia jarkongreso de Rotario Internacia okazis en Bangkoko, Tajlando ,ekde la 6-a ĝis la 9-a de Majo. La ĵurnalo CHIANG MAI MAIL raportis ke pli ol 38 000 Rotarianoj el almenaŭ 160 landoj partoprenis. Multaj el ili venis el aziaj kaj afrikaj landoj.

Kiel kutime la Rotaria Amikaro de Esperanto (RADE) havis budon en la "House of Friendship." En la angla lingvo la nomo de nia amikaro estas "Esperanto World Fellowship of Rotarians."

La ĉefa celo de nia budo estis informi ĉiujn pri la ekzisto kaj karaktero de Esperanto. Almenaŭ 95 procentoj el tiuj, kiuj venis al la budo tute ne sciis , kio estas Esperanto. Multaj vizitantoj al la budo ne antaŭe eĉ konceptis la eblecon de rapide lernebla tuttera lingvo, kiu ne estas landa aŭ etna lingvo.

Sur la muro de nia budo la vizitantoj povis vidi kvar lamenigitajn afiŝojn kiuj montris al ili esperantajn vortojn por la koloroj, la numeroj, la bestoj, kaj kelkaj aĵoj en la klasĉambro. Kelkaj homoj fotis tiujn afiŝojn. Ni ankaŭ elmontris kelkajn paĝojn de materialoj kreitaj de RADE pri la argumento "Kial Esperanto?", pri la laboro de RADEanoj, kaj pri la postenuloj de RADE el diversaj mondpartoj.

Sed la ilo, kiun ni cefe uzis estis la broŝureto desegnita de RADEano S`eri Wells kun la anglalingva titolo "Esperanto: Global Language for the Global Village." Unu parto de ĝi klarigas "What Is Esperanto?" Ĝi ankaŭ informas la leganton pri gravaj ret-paĝoj por la lernado de la lingvo. Ni disdonis proksimume 900 ekzemplerojn de ĉi tiu broŝureto. Pro tio, ni opinias ke almenaŭ 800 homoj, multaj el ili aziaj gejunuloj, por la unua fojo aŭdis pri la ekzisto de Esperanto kaj ekkomprenis ĝian signifon.

Alia celo estis informi Rotarianojn pri la ekzisto kaj laboro de RADE kaj pri la fakto ke RADE estis la unua internacia "fellowship" de Rotario Internacia. RADE akiris unu novan membron, LORENZIN Luce el la francparolanta urbo Nouméa, Nouvelle Calédonie en la Pacifiko orienten de Aŭstralio.

Ronald Glossop, RADEano el Usono, estris la aferon, kaj li ricevis multe da helpo de Mark Starrs, Esperantisto kiu loĝas en Tajlando dum pli ol 35 jaroj. Ekzemple, Mark provizis grandan afiŝon por la budo en la angla kaj taja lingvoj kaj ankaŭ` ekzempleron de lernolibro por Esperanto en la taja lingvo. Li aĉetis por ni kelkajn ekzemplerojn de la broŝureto, kiun ni uzis. Li interparolis kun tajlandanoj ĉe la budo. Bedaŭrinde li povis helpi nur dum unu tago ĉar lia filo venis el Aŭstralio por viziti lin. Kiel kutime, ni ankaŭ ricevis iom da helpo de Marco Kappenberger en la apuda budo de la "Environment Fellowship of Rotarians."

Ni nun ĝoje anticipas la venontan Rotarian jarkongreson en Lisbono, Portugalio.



Mark Starrs, Ron Glossop, kaj vizitanto Sathit Kumarn, prezidanto de la Rotaria Klubo de "Bangkok Port." La granda afiŝo estas en la angla kaj la taja lingvo. Sur la muroj de la budo oni povas vidi maldekstre la afiŝetojn pri kelkaj esperanto-vortoj kaj dekstre la materialojn pri RADE. Sur la kartonoj (kiujn ni devis uzi ĉar la tablo estis tiel malgranda) estas kelkaj materialoj pri Esperanto inkluzive de lernolibro en la taja lingvo kaj la esperanta bildstria libro pri Paul Harris, fondinto de Rotario.

Sergio Pisana ĉe la Rotaria Klubo Romo Olgiato

Nia membro juĝisto Sergio Maria Pisana, loĝanta en Romo, Italio, estas elstara eŭropeisto kaj fervora esperantisto. Notinda lia verko en itala lingvo "La mia Eŭropa", kiun li distribuis pasintjare dum la Itala Kongreso de Esperanto en Torino.

Li difinas sin kiel "eŭropano el Sicilio" kaj en tiu libro de "rememoroj" li pritraktas la historion de la ascendo kaj falo de la eŭropa idealo, ek de la jaroj kvindekaj ĝis hodiaŭ, ne preterlasante ĝian plifirmiĝon kaj sukcesojn.

Jaŭdon la 3an de majo, ĉe la Rotaria Klubo Romo Olgiato, nia samideano Sergio Maria Pisana prelegis pri la lingva problemo en Eŭropo, kiu naskiĝas el la konstato, ke en la Unio reprezentigas pluraj popoloj kaj la diversaj Institucioj (Parlamento, Komisionoj, Jura Kortumo, ktp), konsistas el homoj de malsama lingvo-deveno.

Ekzameninte ĉiujn eblajn lingvo-reĝimojn (plurlingvismo por ĉiuj – kelkaj lingvoj parolataj en la Unio – unulingvismo per nacia aŭ **arterfarita** lingvo), la oratoro proponis la lastan kiel ĝustan solvon, kvankam ne rekte parolante pri Esperanto.

Tamen la aŭskultantaro komprenis kaj multaj demandoj, kiujn la preleganto respondis, rilatis nian lingvon. Enorma la sukceso, malgraŭ la konataj kontraŭaj antaŭjuĝoj

Koincidiga renkontiĝo en Nitra

Dum la somera esperanta studsemajno (SES) en Nitra, la clasĉambro de Bertilo Wennergren situis en hotelo super la ĉambro kie kunvenadis merkrede unu el la lokaj Rotariaj Klubo. Mi diru tuj, ke tiu merkredo la kunveno ne okazis, mi ne scias kial. Sed ĉar ĉiuj ĉeestantoj de la kurso matene ĉiam preterpasis la emblemon de Rotary International, okazo fariĝis bona por mi klarigi al miaj kolegoj kio estas Rotary International. Tion mi faris dum duon- horo helpe

de la bildstrio “Paul Harris, pioniro de nova mondo”. Poste, dum la paŭzo, mi estis surprizita kiam studento de mia klaso prezentis sin Christian Shtarkov RADEano el Ukrainio ĉeestis la saman kurson

La hazardo estis tre feliĉa. Du membroj de RADE hazarde en sama klasĉambro. La ĉi alkroĉita foto montras Christan maldekstre kaj dekstre estas Konstantin Tichomorov, unu el la instruistoj, kiu flue parolas ankaŭ multajn slavajn lingvojn. Sed de kie devenas la flago se la kunveno ne okazis? Reale estas du kluboj en Nitra kaj mi partoprenis la kunvenon de Rotaria Klubo Harmonie merkrede je la tria kaj duono posttagmeze (stranga horo, ĉu ne?). Alia tre interesa renkontiĝo estis kun Saša Pilipoviĉ, RADE membro, kiu prezentis kun Georgo Handzlik kabaredan farson pri kutimoj de esperantistoj. Ni povas fieri havi tian aktoron en nia amikaro.

Joseph van der Vleugel



Rotaria Klubo de Pattaya-Marina informiĝas pri esperanto



Sekvante Mondan Kongreson de Rotario en Bangkoko, Mark Starrs, kiu helpis ĉe nia budo (vidu supren) faris prezentadon pri Rotaria Amikaro de Esperanto kaj internacia lingvo ĉe la Rotaria Klubo de Pattaya-Marina. La temo tre interesis la membrojn, kaj estis sekvita per invito al kurso por iliaj konatuloj je konvena tempo.

Kion fari por propagandi esperanton?

En belga revuo de esperantistoj, Joseph van der Vleugel skribis artikolon pri lernado de esperanto. Ĉu vi same opinias ? Li atendas viajn eventualajn rimarkojn.

Kial, damne, ili ne lernis esperanton ?

En organizoj, asocioj aŭ iuj ajn grupoj, la membroj akceptas novan ideon, nur kiam ĝi konvinkis la unuajn 2,5 procentojn el ili kiuj estas pioniroj². Tre interesaj komentoj sekvis la artikolon de Dennis Keefe kaj mi ankaŭ demandis min kial la aliaj ne lernis esperanton.

Ĝis nun mi konvinkis neniun lerni esperanton. Nature mia motivo certe ne sufiĉis, ĉar lerni malmulte uzitan lingvon pro hobbio ne estas konvinka. Lerni la sanskritan aŭ deĉifri hieroglifojn same efikus.

“ Al kio utilas esperanto?” estas la plej ofta demando. Jes, senkiala ago ne ekzistas. Pli malpli profitdonaj motivoj gvidas niajn diversajn elektojn. Forfuĝi de tiu principo ne eblas kaj la principo de persona profito aplikiĝas ankaŭ en lingvolernado. La internaj avantaĝoj de esperanto, kiel simpleco, logikeco kaj neŭtraleco, ne sufiĉas por alporti rapide al ĉiuj eksterajn avantaĝojn kiel studi en aliaj landoj, legi ĉiutage internaciajn ĵurnalojn, aŭskulti alilandajn radiojn aŭ televidelsendojn kaj precipe fari bonajn negocojn. Ekzemple aktuale kongolanoj lernas la malfacilan ĉinan por aĉeti objektojn en Ĉinio kaj eksporti ilin hejmen³. Homoj pretas pli malpli plene klopodadi kondiĉe, ke la rezulto estas profitdona. Ĉu vi scias ke la nombro de ĉinoj kiuj lernas la anglan estas pli granda ol la nombro de la loĝantaro en Britujo? Kompare kun la internacia lingvo, la angla estus pli internacia, ĉu ne ?

La ideo de esperanto por favori la pacon en la mondo estas utopio pluan fojon. Lingvaj problemoj en internaciaj asembleoj aŭ firmaoj daŭros ankoraŭ longatempe ĉar estas evidente ke superregantaj lingvoj ne malaperos rapide. Multaj homoj kiuj regas ilin neniam rezignos avantaĝon kiun ili akiris multekoste. Nia komunumo entenas klerajn interpretistojn kiuj laboras en internaciaj asembleoj sed ĝis nun ili ne atingis la nombron de 2,5 procentoj kiun ni bezonas por konvinki la aliajn.

Do mi demandas min ĉu ni ankoraŭ devas tiel emfazi la avantaĝojn de esperanto antaŭ ĉiuj homoj por atingi tiun nepran nombron de 2,5 procentoj. Probable ni devos prezenti la avantaĝojn de esperanto al novemuloj de ĉiu grupo. Nepre la junularo devas esti koncernata ĉar ĝi precize arigas homojn kun la kvalitoj de novigantoj.

Mi decidis ankoraŭ legi la libron de R. Selten kaj J. Pool⁴ por scii “*kiun ŝancon havas esperanto fariĝi vaste akceptata mondiskala interkomprenigilo*”. Kuraĝe mi legadis kaj komprenis tekston kaj ekvaciojn ĝis la grafiko de paĝo 102 kie mi rezignis kapdolare. Eĉ la francan klarigon de tiu grafiko mi tute ne komprenis. Tamen kiel la aŭtoro mi konvinkiĝas, sen ekvacio kaj sen grafiko, ke la “*decidoj pri lingvolernado iom similas al decidoj pri aĉetado de modaj varoj*”.

Mia konkludo estas ke la aliaj ne lernis esperanton ĉar en la pasinteco ni ne sufiĉe konvinkis la junularon kaj ke hodiaŭ ni enmodigu esperanton. Teorie bona ideo sed praktike kion fari?

² Studo de Dennis Keefe (La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2012/03/210keef/> La Ondo de Esperanto 2012, n°4)

³ David van Reybrouck, “Congo, une histoire”, Actes Sud.

⁴ Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj - ĉu mi lernu esperanton?, Institut für Kybernetik, Berlin & Paderborn, ISBN 3-929853-03-5

N.B. : Post tiu artikolo mi pensas ke enmodigi esperanton ĉe Rotary International estas tre malfacila sed mi certas ke eblas “rotarigi” esperantistojn ekde elektronikaj kluboj estas permesitaj. Nun ekzistas unu esperantoparolanta klubo

- RADE ĝuas notindan prestiĝon en RI, kiel unua rotaria amikaro (1928), sed tiu prestiĝo ne estas proporcia al la malgranda nombro de niaj membroj.

Ĉar nia Amikaro ne nur akceptas parolantajn esperantistojn rotarianojn, sed ankaŭ simpatiantajn rotarianojn, ni invitas niajn membrojn aligi al RADE siajn familianojn kaj ankaŭ siajn geamikojn rotarianojn, kiuj simpatias al Esperanto.

La aliĝo, kiel oni scias, estas **senpaga!**

Ret-adreso por aliĝi kaj ricevi la aliĝilon:

< bonaespero.brasil@gmail.com >

Sekvas la retadresoj de la RADE Estraro:

1. Eskil Svane - Svislando - [Eskil Svane <pouzasco@gmail.com>](mailto:pouzasco@gmail.com)
2. Marc Lewin – Francio - [<marc.j.levin@orange.fr>](mailto:marc.j.levin@orange.fr)
3. Joseph Van der Vleugel - Belgio [<joseph.vandervleugel@skynet.be>](mailto:joseph.vandervleugel@skynet.be)
4. Sherry Wells – Usono – [<esperantosherry@tm.net >](mailto:esperantosherry@tm.net)
5. Sasa Pilipovic – Serbio - Sasa Pilipovic [<sapy@eunet.rs>](mailto:sapy@eunet.rs)
6. Paul Desailly – Aŭstralio – [<pauldesailly@yahoo.com>](mailto:pauldesailly@yahoo.com)
7. Leandro Freitas – Brazilo – [<freitas.lettras@gmail.com>](mailto:freitas.lettras@gmail.com)
8. Giuseppe Grattapaglia – Brazilo - [<bonaespero.brasil@gmail.com>](mailto:bonaespero.brasil@gmail.com)

[Vizitu kaj Verku por nia paĝaro www.radesperanto.org](http://www.radesperanto.org)

En “Parolas veterano” pago 19, de L. Lentaigne, Amika Esperanto-Rondo, FR-47470 Beauville (Aĉeteblo ĉe UEA) vi povas legi

Svane (Dano) venis en Montpellier, sed ne en la kadro de nia gast-programo. Dana diplomato ĉe UNO, tradukinto de Ĉarto de UNO en Esperanto, li sekvis trimonatan kurson pri la franca en la fakultato. Cele al informado, li lasis al mi tekston en la franca, kiun mi jene esperantigis: *“Mi estis 16-jara, kiam mi audis pri esperanto el la buŝo de miaj gastigantoj, ĉe kiuj mi venis por perfektigi miajn anglajn sciojn. Per dubemo, antaŭjuĝoj, gurditaj opinioj, jen kiel mi, adoleskanto, reagis. Tamen post reveno Danion, mi deziris pliprofundigi la aferon. Ĉu mi konfesu, ke la unuaj lecionoj mirigis min? Post 6-monata studado,*

*tute sola, mi malkovris la flekseblecon gramatikan kaj stilistikan de la lingvo. Pli poste, sendita al UNO kiel diplomato, mi havis la okazon traduki en Esperanton multajn jurajn tekstojn, diversajn rezoluciojn, ktp, kaj ĉefe kunlabori en la tradukado de **Ĉarto de UNO**, kio, laŭ mi, estas nekontestebla pruvo pri utileco kaj vivanteco de la lingvo”*